

La Ĉefaj Datumoj kaj Informoj pri “Novkronavirusa Pneŭmonio” en Lastaj tagoj

Jene mi kolektis kaj resumis la ĉefajn datumojn en la lastaj tagoj en la tabelo kaj ni analizu.

Tabelo de la ĉefaj datumoj pri novkronavirusa pneŭmonio (la 26-a de januaro ---la 4-a de februaro)

Datoj	Konfirmataj Kazoj (resume)	Mortintaj kazoj (resume)	Mortintaj proporcioj (%)	Resanigaj kazoj (resume)	Resanigaj proporcioj (%)
2020-01-26	2744	80	2.915	51	1.859
2020-01-27	4515	106	2.348	60	1.329
2020-01-28	5974	132	2.210	103	1.724
2020-01-29	7711	170	2.205	124	1.608
2020-01-30	9692	213	2.198	171	1.764
2020-01-31	11791	259	2.197	243	2.061
2020-02-01	14380	304	2.114	328	2.281
2020-02-02	17205	361	2.098	475	2.761
2020-02-03	20438	425	2.079	632	3.092
2020-02-4	24324	490	2.014	892	3.667

La supremenciitaj bazaj datumoj deveins el la oficialaj informiloj de **Nacia Sana Komisiono de Ĉina Popola Respubliko**.

1. Tiu tabelo sugestas al ni la jenajn signifojn

1.1. kazoj de “Novkronavirusa Pneŭmonio” en la tuta lando plimultiĝas ĉiun tagon, kio nun estas violente akceliĝanta .

1.2. La mortintaj kazoj ankoraŭ plimultiĝas ĉiun tagon, tamen iliaj mortintaj proporcioj havas la tendencojn de reduktiĝoj, kio signifas ke medicinistoj nun kuracas kaj savas tiujn malsanulojn kun la koronavirusaj pneŭmonioj pli efike tage post tage .

1.3. Rasanigaj kazoj ankaŭ plimultiĝas ĉiun tagon kaj iliaj resanigaj proporcioj havas la tendencojn de la malreduktiĝoj, kio favore montras ke medicinistoj nun kuracas kaj savas tiujn malsanulojn kun la koronavirusaj pneŭmonioj pli efike tage post tage.

1.4. La 1-an de februaro, la nombro de resanigaj kazoj unufoje superis la nombron de mortintaj kazoj, kio havas pozitivan signifon.

La supremenciitaj datumoj kaj analizoj faras nin malĝoje kaj ĝoje kiel duone al duone.

Ni esperas ke kulmino por la konfirmataj kazoj kreski alvenos baldaŭ kaj la resanigaj proporcioj akcelos senĉese.

Tamen ekster la tabelo, troviĝas la aliaj informoj.

Ekzistas ankoraŭ granda nombro da suspektatoj, 23260 (en la 4-a de februaro) , kio oble plimultiĝas ol la nombro de konfirmataj kazoj kaj certe kovas multajn latentajn malsanulojn kun la koronavirus-pneŭmonio.

La medicinistoj primare trovis la eblecon por la koronaviruso infekti homojn tra fekaĵo (fekaĵ-al-buŝo), kio estas unu timiga signo. Kompreneble ili estas plue esplorantaj tiun eblecon.

Tiuj informoj ombras nin, sugestante ke la batalo kontraŭ tiu koronaviruso iros pli longtempe kaj pli malfacile.

Kompreneble okaziĝas kelkaj pozitivaj faktoroj favore kontraŭ la epidemio.

Ĉina registaro plue komencas kelkajn fortajn agadojn por mobilizi tutsociajn resursojn kaj energiojn fokuse helpi mediciajn laborojn kontraŭ la epidemio.

La aliaj urboj praktikas pli severajn reagojn al grava kaj subita publika evento, tio efike

redukto kontaktojn kaj disvastiĝojn de la epidemio.

Miloj kaj miloj da taŭgaj medicinistoj el la tuta lando veturas sinsekve al la epidemiaj zonoj en Hubei provinco kaj klopodas en kliniko kune kun tieaj medicinistoj, kiuj grande malredukta kapablojn efike kuraci kaj savi tiujn malsanulojn.

En la epidemia zono, establigos nelonge kvin modernajn hospitalojn kun pli ol 5 miloj da patient-litoj, kiuj potencigos kapablojn enhospitaligi kaj kuraci tieajn malsanulojn kun tiu malsano.

En pli multaj hospitaloj, medicinistoj de TĈM (Tradicia Ĉina Medicino) partoprenis en kuracadoj de tiuj malsanuloj kune kun medicinistoj de MM kaj akiris evidentajn efikojn, kia kurac-metodo jam enskribiĝis en la Protokolo pri Diagnozo kaj Kurado de Nova Krononavirusa Pneuĉmonio (je la triafoja publikado) (**el Nacia Sana Komisiono de Ĉina Popola Respubliko**)

2. la enhavoj pri kurado per TĈM el la Protokolo .

Jene mi rekomendas la enhavojn pri kurado per TĈM el la Protokolo pri Diagnozo kaj Kurado de Nova Krononavirusa Pneuĉmonio .

Tiu malsano apartenas al la kategorio de epidemio kaj ĝia malsan-kaŭzo estas trafiĝo de epidemiigaĵo.

Oni devas “distingi klare sindromojn kaj plenumi ekzakte kuradon”, konsultante la jenan protokolon, laŭ diferencaj malsan-kondiĉo (situacioj), veter-trajtoj de la zono kaj patient-konstitucioj.

2.1. humid-patogena stagniĝo en la pulmoj

Simptomoj en kliniko:

timado al malvarmo kun aŭ sen febro, seka gorĝo, seka tusado, laco kaj senforto, brust-premo, epigastra pleniĝo iam akompanata de naŭzo aŭ vomado, malkompakta fekaĵo, pala aŭ ruĝeta lang-korpo, blanka kaj graseta lang-tegaĵo, malgranda kaj malforta pulso.

Kuraca metodo:

dispeli humidon kaj senigi tokson, vigligi *pulm-ci-ojn* kaj eleksterigi la patogenon.

Rekomendataj preparitaj drogoj:

Maxing Yigan Dekoktaĵo (麻杏薏甘汤) , *Shengjiangsan* (升降散) , *Dayuanyin Dekoktaĵo* (达原饮) .

Rekomendata baza recepto:

efedro (Herba Ephedrae 麻黄),
amando,
tsaoko (Fructus Tsaoko 草果) ,
arec-sembro (Semen Arecae 槟榔),
cikad-periostraco (Periostracum Cicadae 蝉蜕)
forsitio (Fructus Forsythiae 连翘),
atraktilodo (Rhizoma Atractylodis 苍术),
platicodono (Radix Platycodonis 桔梗)
skutelario (radix Scutellariae 黄芩)
Arcto (Fructus Arctii 牛蒡子)
Kruta glicirizo (Radix Glycyrrhizae 甘草) .

2.2. Varm-patogena obstrukco en la pulmoj

Simptomoj en kliniko:

febro, soifo (sen trink-volo), brust-premo, seka gorĝo sen kraĉaĵo, malbona apetito, malfacila fekado aŭ kun malkompakta fekaĵo, ruĝaj lang-pinto kaj lang-rando, flava lang-tegaĵo, flosa kaj rapida pulso .

Kuraca metodo:

Dispeli humidon kaj senigi tokson, vigligi *pulm-ci-ojn* kaj eleksterigi patogenon.

Rekomendataj preparitaj drogoj:

Maxing Yigan Dekoktaĵo (麻杏薏甘汤) , *Yinqiao pulvoro* (银翘散) .

Rekomendata baza recepto:

efedro (Herba Ephedrae 麻黄),
amando ,
gipso (Gypsum Fibrosum 生石膏)
morio (Cortex Mori 桑白皮)
lonicero (Flos Lonicerae 金银花)
forsitio (Fructus Forsythiae 连翘)
skutelario (radix Scutellariae 黄芩)
fritilari-bulbo (Bulbus Fritillariae Thunbergii 浙贝母)
kruta glicirizo (Radix Glycyrrhizae 甘草) .

2.3. Toks-patogena ŝtopado en la pulmoj.

Simptomoj en kliniko:

febrego, soifo (sen trinki-volo), brust-premo, seka gorĝo sen kraĉaĵo, malbona apetito, malfacila fekado aŭ kun malkompakta fekaĵo, ruĝaj lang-pinto kaj lang-rando, flava lang-tegaĵo, glata kaj rapida pulso .

Kuraca metodo:

malstagnigi *pulm-ci-ojn* kaj senigi tokson, elpeli *fu-organajn* varmojn.

Rekomendataj preparitaj drogoj:

Xuanbai Chengqi Dekoktaĵo (解毒活血汤), *Huanglian Jiedu Dekoktaĵo* (解毒活血汤), *Jiedu Huoxue Dekoktaĵo* (解毒活血汤)

Rekomendata baza recepto:

Amando ,
gipso (Gypsum Fibrosum 生石膏)
trikosanto (fructus trichosanthis 瓜蒌)
rabarbo (Radix et Rhizoma Rhei 大黄)
efedro (Herba Ephedrae 麻黄),
lepid-ŝemo (Semen Lepidi Seu Descurainiae 葶苈子)
persik-ŝemo (Semen Persicae 桃仁)
ruĝ-paeonio (Radix Paeoniae Rubra 赤芍)
kruta glicirizo (Radix Glycyrrhizae 甘草) .

2.4. Interna obstrukc-ŝtopado kaj ekstera kolapso

Simptomoj en kliniko:

sveno, maltrankvilo, brul-varmo ĉe brusto kaj abdomeno, malvarmoj de la kvar tut-membroj, spir-manko aŭ kun spirigilo bezonata, purpura lang-korpo, flav-bruna aŭ seka lang-tegaĵo, flosa, granda kaj senradika pulso .

Kuraca metodo:

malstagnigi *pulm-ci-ojn* kaj senigi tokson, elpeli *fu-organajn* varmojn.

Rekomendataj preparitaj drogoj:

Sinitang Dekoktaĵo plus Renŝen Dekoktaĵo (四逆汤 人参汤) , *Angong Niu Huang Pilolo* (安宫牛黄丸) , *Zixuesan Pulvoro* (紫雪散)

Rekomendata baza recepto:

ginsengo,
prilaborita akonito (Radix Aconiti Lateralis Preparata 附子),
kornuso (Fructus Corni 山茱萸),
akompanata de *Angong Niu Huang Pilolo* aŭ *Zixuesan Pulvoro*.

Noto: laŭ mia komprenado, sindromoj de la “nova krononavirusa pneŭmonio” dividiĝas en la kvar tipojn aŭ kvar periodojn kun ĝiaj sinsekvaj evoluoj .

La unua tipo aŭ periodo estas “**humid-patogena stagniĝo en la pulmoj**”.

La dua tipo aŭ periodo estas “**varm-patogena obstrukco en la pulmoj**”.

La tria tipo aŭ periodo estas **“toks-patogena ŝtopado en la pulmoj”**.

La kvara tipo aŭ periodo estas **“interna obstrukc-ŝtopado kaj ekstera kolapso”**.

Tiuj tipoj aŭ periodoj evoluas ekde la malseriozaj sinsekve ĝis la seriozaj, kiuj havas iliajn proprajn malsan-kaŭzojn, malsan-mekanismojn, ecojn, karakterojn ktp.. Tio decidas la diferencajn kurac-metodojn kaj aplikadojn de diferencaj preparitaj drogoj kaj bazaj receptoj. Tio enkorpigas en si mem la penson ekzakte kaj efike kuraci.

Wang Disheng, Direktoro de ĈMEA
2020-02-05